

182  
STIFTO

**El la enhavo:**

Informoj de komitato

Fervoja vortaro

Interredaktore

Kluba vivo

Nova libro

Schola nova

Lingvaj rajtoj



**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



*UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO  
NAŬDEKJARIĜAS !*

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
aperas 6-roje jare. Abono 16 gld.

E-mail de Starto: starto@clavis.cz

TTT de Starto: www.clavis.cz/starto

E-mail de ĈEA: cea@tmet.cz

TTT de ĈEA: www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio,  
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por  
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla  
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%  
rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokategorioj:** A 160 Kč, B 80 Kč, (C  
nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G  
100 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20  
ECU, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 335 Kč komencantoj,  
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Esperanto, p.s..  
1069, 111 21 Praha 1

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6,  
152 00 Praha, tel. 02/5817732

**Sekcioj de ĈEA:** infana, junulara, skolta,  
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-  
na, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-  
amikara, de esperantaj-kolektantoj

**Komisionoj de ĈEA:** gazetara-informa,  
ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:** 3330-021/0100,  
Komerční banka, Praha 2

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,  
747 05 Opava, tel: 0653/611 823

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878,  
252 29 Dobříchovice, tel. 02.9912201, fakso  
02.9912126

**Vicprezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603  
00 Brno, tel. 05/4323 3047

**Sekretario:** Květa Krajičková, Esperanto, p.s.  
1069, 111 21 Praha 1

**Komitatano:** Lucie Karešová, Tylova 1262,  
508 01 Hořice v Podkrkonoší

**Komitatano:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1,  
696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332  
278, fakso 0631/332 507

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na Nábřeží

45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Jana Holcova,  
Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroy:  
Josef Hron, Libuše Krejčí)

**Kontisto:** Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147  
00 Praha, tel: (02) 4446 0162

**Ĉefdelegito de UEA:** Stanislava Chrdlová,  
Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel.  
02.9912201, fakso 02.9912126

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724  
0690

## Variabilní symboly pro platby ĈES

- 311 expedice, úhrada koupených knih
- 604.2 písemné kurzy
- 604.3 předplatné Starto
- 604.5 předplatné Internacia Fervojisto
- 668 dary svazu
- 694 členské příspěvky ĈES
- 694.1 členské příspěvky UEA
- 789.1 sekce mládeže
- 789.10 sekce šachistů
- 789.11 sekce sběratelů
- 789.13 Sciencia revuo
- 789.15 ediční fond, Ringo
- 789.16 subkonta klubů mimo uvedených
- 789.17 Sekce nevidomých
- 789.19 Propagace v reg. tisku
- 789.3 sekce železničářů
- 789.7 sekce pedagů
- 789.71 ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo)

Variabilní symbol uvádějte na přední straně  
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do  
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby  
Upozornění pro majitele účtů v jiných bank!  
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte  
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK  
PRÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC  
apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol.  
Dojde-li platba s označením „ĈESKÝ ESPE-  
RANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme, kdo a  
proč platí. Takové úhrady účtujeme jako dary  
svazu.

ISSN 1212-009X

Post la januara sesio, pri kiu informis la unua ĉi-jara numero de Starto, okazis pluaj du kunvenoj de la komitato anstataŭ planitaj tri. La aprila estis nuligita pro subite tro elĉerpiginta asocia kaso, kion kaŭzis novaj eldonadoj. La komitatanoj prudente decidis ŝpari financojn kaj necesajn aferojn solvi skriboforme, kio okazis.

Nun koncize pri kunsido okaziginta en Dobřichovice 28.2.: Kun kontentigo estis akceptita fakto ke aperis du gravaj verkoj, kvankam ili iom ŝarĝis niajn financojn. Membroj pri tiuj verkoj jam estis informitaj -

temas pri Majo de Mácha kaj Ĉeĥa-Esperanta vortaro - kaj ambaŭ jam bone vendiĝas. Poste la komitatanoj dediĉis la atenton al ekonomiaj aferoj. V. Kočvara kiel eksprezidanto de LKK metis al la komitato finajn rezultojn de la 81-a UK, kiuj jam estis aprobitaj de UEA. Lige kun tio oni diskutis la asocian mastrumadon en la jaro 1997. Diversaj precizigoj kaj opinioj naskis kelkajn gravajn decidojn, kiuj en estonteco influos la mastrumadon de la asocio. Tio estas ekzemple ŝanĝo de la uzata librotenada metodo ekde la dua duonjaro 1998. La akceptitan

finrezulton la komitato metis al la asocia revizia konsilio por aprobo kaj sekve ĝi estas publikata en tiu ĉi numero. En la sama kunveno estis traktita ĉijara buĝeto, kiu simile kiel en la jaro 1997 superas 300 mil kronojn. Post kelkaj kompletigoj ankaŭ ĝi estis voĉdone akceptita. Plua

parto de la programo rilatis la „Kampanjo 2000“, principe kompilita jam ĉe la jaraŝanĝo. La komitato taskis al la prezidanto vortumi finan tekston de la plano kaj anonci ĝin al respondeculoj en UEA. Intertempe jam realiĝas kelkaj antaŭviditaj even-

toj - aperigo de supre menciita vortaro, preparo de KAEST 1998 sub aŭspicio de UEA (nun jam akceptita). Pluaj tagorderoj de la kunsido rilatis al UEA - temis pri aligitaj kaj individuaj membroj el nia lando, kandidatiĝo por UEA komitato ktp. La kunsido fermiĝis per «diversaĵoj».

Kiel menciite, la aprila kunveno ne okazis, tamen la komitato ne pigris. Laŭ antaŭa decido estis farita inventarado en la asocia deponejo en Praha - tiu laboro konsumis kelkajn finsemajnajn tagojn. Parto de nevendebaj varoj estis likviditaj (difektitaj objektoj aŭ enhave jam

## Informoj de la komitato de ĈEA

netaŭgaj presajoj), parton de uzeblaj materialoj oni pakumis por forsendi ilin senpage al unuopaj kluboj. La pakajoj certe jam enmaniĝis al adresatoj.

Sekva sesio de la komitato okazis 24.5 en Praha. Tuj komence estis traktita kompletigo de la komitato, kies membrino Blanka Gruntová rezignis pro longdaŭra restado eksterlande. Konforme al statuto oni nomumis novan komitatano - Lucie Karešová. Poste la komitato revenis al kelkaj punktoj el pasinta kunveno, estis fermita la inventarado kaj oni solvis kurantajn aferojn. Ĉi tie ni substreku devon **ĝustatempe** fakturi elspezojn el financaj rimedoj ĉe la asocio - tio koncernas klubojn, sekciojn kaj asociajn funkciulojn. Ne eblas plu sendi elspez-dokumentojn post kontofermo de la koncerna jaro (laŭleĝe tio ja eĉ ne estas permesata). La diskuto dum la kunveno revenis ankaŭ al planita engaĝiĝo de UEA al agado „Praha - ĉefurbo de kulturo 2000“. Post esploro de eblecoj gajni tiucele ian subvencion de la ŝtato aŭ de la ĉefurbo, kiu estas praktike nereala, la komitato cedis aliĝi al tiu ĉi ĉefurba evento kaj nia asocio agos tute sendepende de tio. Samtempe la komitato diskutis antaŭvidatajn esperantistajn eventojn en 1998 (la asocia konferenco en Jablonec, KAEST 98, vina seminario) kaj en 1999 (kongreso de ĈEA, UMEA-kongreso en Opava, SAT-kongreso kaj ILEI-konferenco en K. Vary, UK

en Berlino), plue aliajn diversajn eventojn de niaj kluboj. Vico da ili estis sukcesaj, bone organizitaj kaj sufiĉe vizititaj kaj ties organizintoj meritas laŭdon: Jablonec n/Nis., Šumperk, Vracov, Ostrava-Vítkovice kaj aliaj.

Fine de la kunsido la komitato interesiĝis pri diversaj temoj el nia enlanda agado.

Venonta kunveno okazos en Opava fine de junio kaj pri ĝi ni informos nur post ferioj.

kov

### **Plej bona propagando...**

Se ni volas disvastigadi la internacian lingvon en nia lando, antaŭ ĉio necesas, ke en la librovendejoj estu aĉeteblaj lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto. La librovendistoj ilin vendas nur tiam, kiam la publiko ilin aĉetas. Kompreneble, se eĉ esperantistoj mem ne aĉetas tiujn librojn, la vendejoj ilin ĉesas mendi, la lerniloj malaperas el montrofenestroj kaj librobretoj. Esperanto fariĝas por la publiko nevidebla kaj neatingebla. Samtempe la eldonitaj publikaĵoj stokiĝas en kelo de la eldonisto kiel nevendeblaj varoj, blokas spacon kaj la elspezitan monon, estas mem endanĝerigitaj de humideco kaj ŝimo.

Male, se ni mem aĉetas tiujn librojn **pere de librovendejoj**, ni motivigas la librovendejojn mendadi lernilojn pri Esperanto kaj tiamaniere ilin proponi al la publiko. Jen la plej efika propagando.

Esperanto-klubo Plzeň  
aranĝas por esperantistoj kaj favorantoj de  
Esperanto kaj turistoj jam 7-an Refreŝigan  
Esperantistan Tendaron (RET) en vilaĝo

## NEKVASOVY

ĉe urbeto Nepomuk, distrikto Plzeň-sudo

La tendaro efektiviĝos de la 16-a ĝis 29-a de aŭgusto 1998 (eblas partopreni nur unu semajnon aŭ eĉ malpli longan tempon)

Pitoreska vilaĝeto Nekvasovy situas inter trakostacioj Nepomuk kaj Pačejov sur la fervojtrako Plzeň - České Budějovice (No 190). Arbariĉa ĉirkaŭaĵo, senindustria kaj relative malproksima de ĉefaj aŭtostradoj, pura kaj tenera, taŭgas por kolektado de fungoj kaj arbaraj fruktoj.

Loĝadon en turisma tranoktejo de Sporta Klubo rande de la vilaĝo, 30 minutojn de fervojstacio Nekvasovy, en 6-7 litaj ĉambroj, kuirejo, manĝejo kaj fundamenta higiena ekipaĵo. La vilaĝo posedas nutrajvendejon, gastejon, poŝtoŝtacion, sportejon kaj naĝejon.

Manĝadon 3-foje tage certigas kuiristinoj el membrinoj de E-klubo en Plzeň.

Programo: konversaciaj rondetoj, lingvaj konkursoj kaj ludoj, sociaj, sportaj kaj amuzaj ludoj, komuna gimnastikado, naĝado, sunbanado, ekskursoj en ĉirkaŭaĵon.  
Prezroj:

1 semajno - 1 330 Kč, 1 410 Sk, 90 DEM  
2 semajnoj - 2 130 Kč, 2 245 Sk, 140 DEM

Pli detalajn informojn petu je adreso:

S-ro Jiří Vomáčka

prezidanto de Esperanto-klubo

Koterovská ul. ĉ. 30

301 41 Plzeň

Ĉeĥa Respubliko

17-a katolika Esperanto-Tendaro en

## SEBRANICE

apud Litomyšl 18.7. - 1.8.1998, aranĝita de Katolika sekcio de ĈEA (ĉeĥa sekcio de IKUE), invitas plenkreskulojn kaj geknabojn ekde 14 jaroj (infanoj sub 14 jaroj en akompano de plenkreskulo), kiuj deziras travivi du semajnojn en medio de kristana frata amo kaj reciproka kompreno. Programoj: spirita (mesoj, preĝoj, prelegoj), lingva (kursoj de Esperanto por komentantoj, progresintoj, konversaciaj - unu deviga), amuza (naĝado, sportoj, tendarfajroj, kantado).

Prezo 1400 Kč (studentoj, handicapuloj k.s.), 1600 Kč (laboruloj).

Aliĝu ĉe: Katolická sekce ČES, Miloslav Šváček, Tršická ul. 6, 751 27 Penčice.

*Invito al pilgrimo de esperantistoj kaj partoprenantoj de la Katolika E-Tendaro al Katedralo de la Sankta Spirito en Hradec Králové - esperantlingvan Sanktan Meson 30.7.1998 je la 10-a horo celebros patro episkopo Karel Otčenášek, patrono de ĉeĥaj katolikaj esperantistoj, kaj patro Lajos Kóbor el Hungario, vicprezidanto de IKUE, kadre de la jaro de Sankta Spirito, kiu estas preparjaro por Jubilea Sankta Jaro 2000.*

Renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj katolikaj esperantistoj 21.-23.1998 en Žilina (Slovakio), en Salesana domo (strato Saleziánská cesta) invitas ne nur katolikojn. Krom kunsidoj de unuopaj IKUE-sekcioj estos en la programo ankaŭ esperantlingvaj mesoj kaj prelegoj, ekskurso al pilgrimloko Rájecká Lesná kaj amuzaj programeroj. La partoprenkotizo 440,- Sk. Aliĝojn akceptas ing. Vladimír Němec, Zvolenská ul. 5, 010 08 Žilina, Slovakio. Ĉeĥoj povas pagi 440 Kč pere de katolika sekcio de ĈEA.

**Chcete se rozmluvit  
v esperantu?  
Jedte v září do Vracova!**



Pedagogická sekce našeho svazu pořádá ve dnech 11.-13. září 1998 ve Vracově u Kyjova tzv. „Paroligaj kursoj“, které jsou určeny pro ty, kteří nemají možnost rozmlouvat v klubech nebo v rodině a chtěli by se pocvičit v mluveném esperantu. Počítáme např. s absolventy písmených kurzů nebo těmi, kteří sice do klubu chodí, ale mluvit si netroufají. Zájemci pište na adresu: Jana Melichárková, 696 02 Ratiškovice 938, tel. 0628/367 404.

## LANČOV 40-jara

Esperanto-kursoj en tendaro apud la vilaĝo Lančov ĉe la digolago Vranov okazis unuafoje en 1958. La ĉijaran proponon ni publikigis en Staro 1/1998 sur p. 23 kaj ĝi estas legebla ankaŭ en Internet. Vizitu nian plej malnovan Esperanto-kursejon!

## Tradiciaj lingvaj seminarioj en Skokovy

en Ĉeĥa paradizo, aranĝita de AEH, okazis 14.4.-19.4.1998. Partoprenis 30 geesperantistoj el 16 urboj de Ĉeĥio, kiuj plifortigis sian sanon ankaŭ korpe kiel anime. La aŭtuna seminario komenciĝos la 8-an de novembro kaj daŭros la tutan semajnon. La loĝado kaj mango trifoje tage kostas ĉ. 1.600 Kč. Interesatoj povas aliĝi al adreso: Jindra Drahotová, Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav. Informojn vi povas peti kontraŭ afrankita koverto kun adreso kaj 20 Kč. Bonvolu indiki la tempon de via alveno, demandu pri ĉio, kio vin interesas.

**Artikolojn pri Esperanto**, kiuj aperas en ĉeĥaj periodaĵoj ne forgesu sendadi (almenaŭ kopiojn) al la estro de la komisiono por gazetaro kaj informado: Drahomír Kočvara, Hulvácká 18, 700 30 Ostrava-Zábřeh.

## Ni kondolencas

- En EK Olomouc forpasis dumviva membro de ĈEA Stanislav Petružela el Prostějov (nask. 1933)  
- Mortis 23.1.1998 fidela membro de EK Ostrava Vítkovice s-ano Vladislav Srokoš en aĝo de 91 jaroj. Kiel 80-jarulo li partoprenis konversacian kurson en Somera Esperanto-Tendaro en Lančov kaj li estis plej aĝa lernanto tuttendara. Lia ekzemplo montras, ke neniam estas malfrue komenci studadon.



# Scivole tra Esperantujo

## Korespondemuloj

povas trovi interesajn adresojn aŭ publikigi la sian ĉe Internacia Koresponda Adresaro Esperantista, adreso: R.J.Zvěřina, 5. května 26, 460 01 Liberec, Ĉeĥio.

## Esperanto-klubo Ostrava-Vítkovice

Nia jarkunveno okazis 18.4.1998 je la 17.00h en la klubejo. Partoprenis ĝin 18 membroj kaj gastoj el EK Pŕerov, Prostějov, Haviřov, kaj prezidanto de ĈEA Ing. V. Kočvara. Jarraporto malkovris, ke aktiveco plejparte koncentriĝas je malgranda 10-membra kolektivo kaj komitato. Kvankam pagis nunjare 69 membroj, nur tiu grupeto aktivis en kunvenado, vojaĝado, publikado, prelegado kaj aĉetado de asociaj materialoj. Instruado de 5-membra skolta grupo en Krmelín, kiun gvidas Pavel Jarolím, estas nia espero por estonteco. Entuziasmigis nin informoj de prezidanto de ĈEA pri preparataj eldonaĵoj, renovigo de sciencaj kolokvoj kaj proksimiĝanta konferenco en Jablonec n. N.

## EK en Ostrava-Poruba

dank' al oferema instruado de Milada Mikolajková kaj Vlado Sládeček dum tuta lernejjaro frekventis kurson por komencantoj kaj progresintoj, ĉiulunde de 15 ĝis 17 h en Klubo de emerituloj je Sokolovská strato. Ili havis du klubejojn samtempe al dispono senpage. En koridoro ili povas libere pendigadi afiŝojn pri Esperantaj aranĝoj. En mezo de urbo ili havas al dispono montronfenestron pli ol 3 m larĝan. Nun ili tie propagandas per afiŝo proksimiĝantan UEA kongreson en Montpellier. Bedaŭrinde proksimiĝanta balotado kaŭzis, ke ili post Paskofesto je 3 monatoj perdis klubejon, kie estis lokita provizejo de balotiloj. Vane ili serĉis klubejon provizoran en lernejoj kaj biblioteko. Do ili devas nunjare fini sezonon nekutime frue.

## La 6a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto

okazos en Pekino 19.-25. 8. 1998. Inter aliaj kunvenos ankaŭ grupo pri medicino kaj medikamenta kuracado. Laborlingvo: Esperanto. Kotizo 180 USD, 50 USD por internaciaj membroj de E-asocio kaj membroj de UMEA aŭ SAT. Logado 30, 50, 100 USD laŭ kategorioj. Dum la konferenco realiĝos rapida kurso de ĉina akupunkturo. Inf.: Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio ĉe Ĉina Akademio de sciencoj - 52 Sanlihe, Being 100864, Ĉinii, fakso 0086-10-6851 2454.

## Esperanto denove en Fervoja Horaro

Dank' al iniciato de nia fervojista sekcio reaperis en la fervojista horaro (kiu ĉijare kostas 79 Kč)

la instrukcioj en Esperanto (unua volumo, paĝoj A14-A15), eĉ kun kontakta adreso al la



ĈEA-sekcio kaj slogano „Reloj ligas landojn, Esperanto la popolojn.“ La presejo ne posedas niajn signojn, tial en la teksto anstataŭ supersignoj aperis majuskloj (pasaĜero = pasaĝero), sed ni petas niajn membrojn pri indulgo, ke ili ne sendu protestojn kaj ne sabotu tiamaniere la sukceson de nia fervojista sekcio.

## 90 jaroj de EK en Hradec Králové 1908 - 1998

Estimataj gesamideanoj, permesu al ni kune rememori la 90-an datrevenon de Esperantista Klubo en Hradec Králové. En nia klubo laboris multe da gravaj personoj rilate al kultura vivo en ĉeĥa movado kaj tutmonda Esperantista movado.

Nun niaj gesamideanoj kunvenas en Gimnazio Božena Němcová en Hradec Králové. Kelkaj gesamideanoj partoprenas regule Universalajn Kongresojn.

Estimataj gesamideanoj, permesu al ni rememorigi samideanojn, kiuj bedaŭrinde jam ne plu estas inter ni. Dum la pasinta jaro forpasis samideanino

Ludmila Lukášová (91-jara) kaj samideano Miroslav Bartoň (86-jara), prezidanto de nia klubo en Hradec Králové dum la jaro 1996.

Honoro al iliaj memoroj.

Prezidanto de klubo  
Bohuslav Souček

## La 5-a naturamika renkontiĝo en Luzacia montaro

Jam la kvinan fojon renkontiĝis naturamikoj en Ĉeĥio. La renkontiĝo okazis ĉijare en belega, pitoreska parto de Luzacia montaro inter Polesí kaj Hrádek nad Nisou. Ĉeestis 32 personoj, inter jaŭdo, la 21-an de de majo, kaj dimanĉo, la 24-an de de majo, ni loĝis en hotelo Černá Louže kaj vagadis tra arbariĉa montara dorso kun multaj sabloŝtonaj rokoj. Oficiale la renkontiĝo komenciĝis nur vendrede vespere, sed multaj naturamikoj venis pli frue por ĝui tiean puran montaran naturon.

Senlaca Míla Jíra el Jablonec nad Nisou kun sia malgranda organiza teamo zorgis pri tio, ke ni konatiĝu en limigita tempo kun ĉiuj naturvidindaĵoj de la regiono. La vetero, ŝanĝiĝema kaj pluvvetera, ne influis amikan etoson.

Survoje al la Germana E-kongreso alveturis ankaŭ biciklanto el Haviřov, s-ano Oldřich Schwetter. Dimanĉe, post vizito de kastelo Lemberk kaj urbo Jablunné v Podještědí ni adiaŭis la organizantojn kaj dankis ilin. Parto de ĉeestantoj poste supreniris la monton Tlustec, triste konata pro ekspluatado de bazalto.

Dankon al la organizintoj!


Václav Stibůrek



## ADONIDO HLAVÁČEK JARNÍ

KE Vracov aranĝis en aprilo jam 7-an renkontiĝon por viziti regionon, kie kreskas rara floro „ADONIDO“.

Ĉiuj, kiuj partoprenis t.s. pli ol 25 esperantistoj el diversaj lokoj estis vere kontentaj. La belan ekskurson akompanis bona vetero kaj ĉefe bona humoro. Unue ni vizitis esp. familion Vašinkovi en Vracov, kiuj produktas manĉipanon. Krona refreŝigo la volontuloj provis fari manĉipanaĵojn.



Partoprenintoj trarigardis novrekonstruitan kastelon Milotice, poste herbejon, kie kreskas la adonido kaj fine vinkelon, kie regis bona humoro, kontento kaj kie oni ĉe bona vino kantis, babilis ktp. La tranokton prizorgis du lokaj esperantistinoj.

Same sukcesan kaj regulan renkontiĝon, eĉ malgraŭ ne tre favora vetero, aranĝis EK Ŝumperk sub gvido de Kvido (Janík). Unue ni vizitis esplorinstituton de lino kaj legumenoj, kiun al ni montris unu estrarano kurt entuziasmo, kvankam estis sabato. Multaj el ni vidis kreskantajn linojn kaj kanabon unuafoje, same kiel la rikoltadon kaj

teksadon. - Poste ni veturis al sporta flughaveno, kie niaj volontuloj uzis la eblon flugi kaj rigardi la montojn el 300-metra alto. Por momento ni rigardis la valbarajon Krásné kaj haltis en vilaĝo Hraběšice. Tie ni trarigardis moderne rekonstruitan preĝejon kaj tagmanĝis en loka gastejo. Post tagmanĝo okazis prezentado de reprezentantoj de diversaj esp. kluboj, okazis granda tombolo kaj refreŝigo de bongustaĵoj, kiujn preparis organizantinoj.

Entute la ekskurson partoprenis 40 personoj. Sed partoprenintoj estis ne nur el proksima regiono de Ŝumperk, sed ankaŭ el Nymburk, Benešov, Brno, Prostějov, Lipník, Přerov, Opava, Lanškroun ktp.

Ambaŭ aranĝoj estis vere sukcesaj, domaĝe, ke en la sama tempo kiel en Ŝumperk okazis alia en Svitavy, ĉar multaj intencis viziti ambaŭ aranĝoj. Estus bone, se ĉiuj EK, kiuj intencas ion aranĝi, frue informus estraron de ĈEA aŭ pere de STARTO.

## BET-34

La 34-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj realiĝos inter la 17.-24. 7.1998 en la sudlitovia urbeto VEISIEJAI en agrokultura lernejo kun salonoj, aŭditorioj, studenta komunloĝejo, hoteleto. BET celas elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn de E-movado, perfektigi la paroladon, doni enhavoriĉan pasigon de la tempo. Aliĝkotizo por eks-socialismaj landoj estas 20 lidoj (5 USD), kontaktadreso: Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-3000 KAUNAS, Litovio.



## Bicikle al la germana kongreso

Mi sendas al vi saluton el Dresdeno, kie mi partoprenis la 76-an Germanan Esperanto-Kongreson. Mi trabiciklis 765 km kaj solenis tiamaniere miajn 72 jarojn. Dum la biciklado mi efektivigis 17 prelegojn kaj la lasta 18-a estis en Dresdeno: *Bicikle kaj helpe de E-o tra 11 eŭropaj ŝtatoj*. - Mi vizitis ankaŭ s-ron Vítězslav Dostál, kiu estas la unua homo kaj unua ĉeĥo, kiu ĉirkaŭbiciklis la terglobon (3 jarojn = 60.000 km). Poste mi parolis kun li 1 horon en ĉeĥa radio Olomouc pri miaj biciklaj travivaĵoj, multe mi propagandis Esperanton. Mi ankaŭ partoprenis la 5-an Renkontiĝon de Esperantistaj Naturamikoj en Rynoltice - Černá Louka, ĉe Liberec.

Oldřich Schwetter

## Eksjunularo Ostrava

denove renkontiĝis en EK Ostrava-Vitkovice la 30.6.98 en la klubejo de SSK Šalounová 38. Kolektiĝis 23 eksjunuloj el 50-aj ĝis 70-aj jaroj, kiuj tiam malgraŭ malfavoraj kondiĉoj organizis tendarojn en Žimrovice, eldonadis gazeton Tagiĝo, kunlaboris

kun pacmovado. El plej malproksima loko de 400 km alveturis F. Strumiský. ĈEA-prezidanto V. Kočvara informis pri aŭtuna konferenco en Jablonec kaj pri pola-ĉeĥa-slovaka renkontiĝo sur la monto Čantoryja (21.6.1998).

## 11.111 SUBSKRIBIS LA MANIFESTON DE PRAGO

La nombro de subskriboj por la Manifesto de Prago atingis „rondan“ ciferon la 15-an de majo, ĉar en tiu tago la Centra Oficejo de UEA registris la 11.111-an apoganton. En sia aprila kunsido la Estraro de UEA trovis tre pozitiva la daŭran kolektadon de subskriboj. Ĝi estas efika maniero por diskonigi la enhavon de la Manifesto kaj proksimigi ĝin al la esperantistoj. Tio kontribuas al unu el la ĉefaj celoj de Kampanjo 2000: levi la idean nivelon de la Esperanto-movado. Tial la Estraro instigas ĉiujn organizaĵojn kaj unuopulojn plu kolekti subskribojn. La Centra Oficejo de UEA volonte disponigas tiucele poŝtkartojn kun loko por 5 subskriboj kaj foliojn por 20 subskriboj. Por helpi al tiuj, kiuj deziras pli profunde studi la enhavon de la Manifesto, UEA preparas studkajeron kun artikoloj pri ĉiuj sep tezoj de la Manifesto. La kajero estos uzebla por memstudado sed ĝi aparte taŭgos kiel enkonduko por diskutoj ekz. en kluboj kaj Esperanto-aranĝoj. Ĝi estos lanĉita en la UK en Montpeliero.

Rimarko: La ĉeĥa versio de la manifesto estas trovebla en Interneto ĉe la paĝo de Starto <[www.clavis.cz/starto](http://www.clavis.cz/starto)>.

## Pri ciganoj

Niaj ciganoj komencis migri eksterlanden kaj oni parolas pri „cigana demando“. Sed ciganoj foriras ankaŭ el Pollando, Slovakio kaj Hungario, „ciganan problemon“ oni solvas en Kanado, Francujo, Britio eĉ en Aŭstralio. Kie estas radikoj de tiuj problemoj?

Ciganoj estas elpelitoj de socio jam ses jarcentojn. Unuaj skribaj notoj en Ĉeĥio kaj Slovakio mencias ilin en 1417. Imperiestro Ferdinando I ordonis en 1545 elpeladi ciganojn el la lando, fine de la 17-a jc, ili estis pro nomado markitaj kiel proskribitoj, kiujn oni povas senpune torturi kaj virojn eĉ mortigi. La situacio pliboniĝis dum regado de Maria Teresia kaj ŝia filo, Jozefo II, kiu ordonis lernejan edukadon de ciganaĵ infanoj.

Post la unua mondmilito la Ĉeĥoslovaka respubliko en 1927 eldonis leĝon *Pri nomadaĵ ciganoj*, laŭ kiu nomadoj estis registritaj, kelkaj lokoj estis por ili malpermesitaj, infanoj sub 18 jaroj povis esti forprenitaj. Nazioj ekstermis multajn ciganojn en koncentrejoj.

Dum komunisma epoko en 1965 aperis ordono, ke en civito rajtas loĝi maksimume 5% de ciganoj, dum ceteraj estis disigitaj tra la lando. Ili estis malame akceptitaj ne nur de „blanka“ socio, sed ankaŭ de „romaoj“ tie vivantaj. Novaj ciganoj ne kapablis loĝi en domoj kaj loĝejoj, ricevitaj de ŝtato, detruadis ilin, sed nomadi ili ne rajtis laŭ leĝo de 1958.

Preskaŭ 80% de niaj nuntempaj ciganoj devenas el Slovakio kaj vivas ĉe

nŭ kvindek jarojn. El Rumanio venis „olaŝoj“, kies familioj apartenas al plej riĉaj kaj rilatas malamike al ceteraj ciganoj, kiujn ili nomas „rumungro“.

Neniu scias la nombron de ciganoj ĉe ni. En 1991 nur 30.000 personoj elektis ciganan / romaan naciecon, sed supozeble ili estas dekoble pli multaj. En nuna tempo la malkleraj ciganoj malfacile trovas bone pagatan laboron, la salajroj estas ofte eĉ malpli altaj ol subteno en senlaboreco. Kion fari?

J. Drahotová



## Hundo kaj ĝia aŭro

Aŭro estas energia elradiado de kreiraĵoj, vegetaĵoj kaj ŝtonoj speguliganta ilian karakteron kaj fotografebla per speciala aŭrokamero. Antaŭ nelonge mi fotigis mian aŭron, kiu estis violkolora, kaj aŭron de mia kvarjara ŝafhundino, kiu brilis blue-viole. Tio estas la plej valora aŭro de spiritaĵ instruistoj. Mia hundo do estas escepta individuo, kunigita kun spirita kaj kosma leĝaro, kiun ĝi plenumas.

Pavla Zemanová



# Fervojista vortaro



Mi sendas mallongan informon al la artikolo „Fervoja terminaro...” en Starto 2/1998, p. 16.

Unue pri esperanta parto.

Ĝi estas farita sur bazo de Fervoja Terminaro en Esperanto (FT) eldonita de IFEF 1989, kiu estas suplemento al *Lexique Général des Termes Ferroviaires (LG)* - Eldonis Fervoja Unio (UIC), 1985. Temas pri IVa eldono (LG IV). Tiu granda vortaro estas seslingva. La nova vortaro, pri kiu skribis Starto, estas laŭvere la V-a eldono de LG. La originalo estas sur CD-Rom diskoj. Por ĝi ni (la ĉeĥa komisiono) ne plu kunlaboris, ĉar ni ne posedas bezonatan komputilon. Rail-Lexis, kiel oni nomas ĝin, enhavas novajn terminojn ne aperintajn en LG IV kaj multaj estis ŝanĝitaj kontraŭe al LG IV (FT), ne ĉiam bone.

La LG IV (FT) preparis terminara komisiono de IFEF, kiu konsistis mezkvante el 35 membroj (la nombro ofte ŝanĝiĝis) el 12 eŭropaj landoj. Elektita estis tiu vorto, termino, kiu ricevis majoritatajn voĉojn. Nia ĉeĥa komisiono - kiu estis 5-8-membra - ne konsentis kun ĉiuj. Plimulto validas.

Kiam vortaro FT aperis, estis dirite, ke ĝi estas leĝo por la fervojfaka lingvo. Por Rail-Lexis, bedaŭrinde tio ne validas.

Tio estas pri la esperanta parto de la vortaro. Nun al la ĉeĥa.

Kiel mi menciis supre - **ni ne plu kunlaboris**. Aŭtoron mi ne konas. Kun la vortaro mi (ni) konatiĝis post ricevo de la jam prespreta. Ni estis tre surprizitaj pri tre multaj mankoj, eraroj. Al mi ŝajnas, ke la tradukanto ne estas fervojisto, ĉeĥo. Plu mi dubas, ĉu estas bona esperantisto. Kelkaj ekzemploj de malbonaĵoj:

**bileto kuŝloko** = *příplatek na lehátko* povus esti *lehátkový lístek*

**reltenaĵlo** = *zvedák kolejový*, tamen temas pri *kleště na kolejnice*.

Nun unu interesajo:

**relkurbiĝo** = *elektrický oblouk* (???). Termino *relkurbiĝo* NE ekzistas, nenie mi trovis ĝin, kaj **elektrický oblouk** = *elektra arko*. Similaj eraroj estas dekoj en la vortaro.

El la komisiono vivas ankoraŭ inĝ. Zdeněk Polák kaj mi. Ni ambaŭ ne konsentas kun tiu ĉi mistraduko, sed estas malfortaj por ion korekti. Propono al kelkaj interesatoj pri terminologio helpi al korektado estis malsukcesa. Do, ĉio restos, kiel estas.

La vortaro estas granda sukceso por la faka lingvo, kiu bezonas ankoraŭ multe da polurado kaj plibonigo.

Tio estas miaj personaj opinioj pri Rail-Lexis vortaro kaj informi por vi.

*Jaroslav David, Pustějov*

## Esperanto en la Internacia kontrakt-ekspozicio SCHOLA NOVA en Prago

Dum la tagoj 1998-03-24/26 okazis en Praga Veletržní palác (Foiralpalaco) internacia kontrakt-ekspozicio SCHOLA NOVA, kiun partoprenis per propra ekspozicio ankaŭ Kongresa kaj Kleriga Entrepreno de Petro Chrdle KAVA-PECH. Ĝi ofertis servojn en la fako de kleriga turismo kaj kompletan kolekton de ĉiuj publikaĵoj de sia eldonejo, kiuj iamaniere tuŝas pedagogion kaj edukadon.

Estas klare, ke plejparton de la libroj en la kolekto de KAVAPECH kreis tiuj skribitaj en la ĉeĥa. Plej granda intereso de la faka publiko estis pri du manlibroj: „Novaĵoj en la ĉeĥa ortografio kaj vortfarado“ verkita de prof. Brabcova, estro de la katedro pri la ĉeĥa lingvo en Pedagogia Fakultato de Karola Universitato en Prago kaj „Novaĵoj en la germana ortografio“ (skribita en la ĉeĥa), kies aŭtoro estas konata ĉeĥa esperantistino vivanta en Germanio Věra Barandovská-Frank.

Sed KAVA-PECH ekspoziciis ankaŭ siajn eldonaĵojn en aliaj lingvoj. Temis pri ĉiuj, kiujn ĝi eldonis en kunlaboro kun la eksterlandaj eldonejoj okupiĝantaj pri la

pedagogio (KoPaed Muenchen, IfK Berlin-Paderborn), sed ankaŭ pri tiuj, kiujn ĝi eldonis ene de la internacia grupo de sciencaj eldonejoj (enkadre de AIS) Akademia Libroservo (tiuj estas skribitaj en la germana, en Esperanto aŭ plurlingve).

Esperanto estis reprezentita en du ekspoziciitaj kolektoj de KAVA-PECH:

1. „Lingvaj lerniloj, manlibroj kaj vortaroj“. Ĉi tiu kolekto tiris plej grandan atenton. Ĝi enhavis ankaŭ jenajn verkojn rilate Esperanton:

Lernolibron de Esperanto por Ĉeĥoj „Esperantom por tri mēscice“ verkitan de geedzoj Chrdle, Esperantan-ĉeĥan vortaron de aŭtoro duopo Kraft-Malovec, novan Ĉeĥan-esperantan vortaron de Karel Kraft, sed ankaŭ en Esperanto skribitan „Gramatikon de la ĉeĥa“

de Miroslav Malovec kaj „Bazan ĉeĥan konversacion“ de aŭtoro duopo Chrdlová - Malovec. Apud la lasta estis ekspoziciitaj ankaŭ ties tradukoj en naciajn lingvojn: „Basic Czech Conversational Guide“ (tradukis Richard Howard), „Einfach tschechisch sprechen“ (tr. Reinhard Foessmeier) kaj „Conversational tcheque de base“ (tr. Helene Barkovic).



2. „Publikajoj en la internacia lingvo Esperanto” estis kolekto, en kiu ripetigis la lernolibro kaj vortaroj, sed en kiu estis ekspoziciita ankaŭ la tuta kolekto de la verkoj en Esperanto eldonita de KAVA-PECH, frunte de la pedagogia verko Enkonduko en la kibernetikan peragogion de H. Frank, kun okulfrappe lokigitaj tradukoj de la plej konataj ĉefaj aŭtoroj (Václav Havel, Karel Čapek, Jaroslav Hašek, ...).

La rezultoj kaj spertoj de tiu eksperimento:

- kvankam ni neniel trudis Esperanton, multaj preterpasantoj (plejparte kun miro, ofte kun ioma moko) alparolis nin pri ĝi kaj ni volonte respondadis kaj diskutis. Mi eĉ povas aserti, ke pli da demandoj estis pri Esperanto ol pri la fakaj verkoj, kiujn oni nur trafolumadis senvorte.

- de komerca vidpunkto temis pri fiasko, ĉar venis eĉ ne unu mendo rilate Esperanton. Tamen ni foriris kun bona sento, ke ni faris ion pozitivan por levo de ĝenerala konscio pri Esperanto kaj ĝiaj ebloj, precipe direkte al la fakaro okupiganta pri edukado.

- post la ekspozicio, kiam eksciis pri ĝi la pragaj esperantistoj, ni iom suferis riproĉojn de kelkaj, ke ni ne antaŭanoncis la ekspozicion de E-eldonaĵoj al ili: “Ni ja volonte pagus la enirbileton kaj demonstrus

intereson pri Esperanto”. Mi ĉi tie konfesas, ke ĝuste pro tio ni silentis. Ni multekoste pagis niajn 4 kvadratajn metrojn ĉefe por negoci tie kaj ne ŝtopi la spacon per babilemaj “demonstrantaj” esperantistoj. Kaj nur kiel flankan (tamen ne malgravan) taskon ni donis al ni informi NEESPERANTISTOJN pri Esperanto kaj ties kulturo - kaj tiurilate ni vere sukcesis.

Petro Chrdle

### La dua kongreso de kroataj esperantistoj

En Varaždin en la norda Kroatio pli ol 150 partoprenantoj kunvenis por la Dua kongreso de kroataj esperantistoj. Krom la kroataj esperantistoj el 26 lokoj de Kroatio partoprenis gastoj el Hungario, Italio, Germanio kaj Nederlando. Precipe grandnombra estis la Esperanta delegacio el la amika urbo de Varaždin Zalagerszeg. Kroata Esperanto-Ligo prezentis dum la kongreso 3 novajn librojn: Antologion de la kroata milita lirika kiun prezentis aktorino Vida Jerman. Akompanis ŝian programon gitaristoj de la fama Muziklernejo de Varaždin. Infanoj-esperantistoj Tina Tišljar kaj David Re-Hudeček prezentis du novajn porinfanajn librojn: MIRINDAJ AVENTUROJ DE METILERNANTO HLAPIČ en traduko de Maja Tišljar kaj

KAMARADARO DE PETRO NODETO kiun esperantigis Josip Pleadin. Dum la kongreso estis prezentita ankaŭ la nova Esperanta urboprospekto de Varaždin. Nikola Rašić festparolis renkonte al la jaro 2001 kiam Kroatio gastigos Universalan Kongreson de Esperanto. La Ronda Tablo pri Kroatio reliefigis plurajn problemojn kaj esperojn de la Esperanto-Movado en Kroatio, kiu denove konfirmiĝis kiel esence kultura movado. La gastiganto de la nacia kongreso en 1999 estos Osijek dum por la jaro 2000 kandidatas urboj Džurjdevac kaj Sinj. La kongreson modele organizis Esperanto-Societo Božidar Vančik el Varaždin.



Spomenka Štimec

### AIS-IKU 1998 en Montpellier

Ankaŭ dum la UK en Montpellier (FR), AIS okazigas Internacian Studadsesion lige kun la Internacia Kongresa Universitato (IKU) de UEA. "AIS-IKU" konsistos el tri kursoj po ok-lecionaj. La unuaj lecionoj de du kursoj estos samtempe prelegoj de IKU. Prelegoj kaj kursestros: Prof. Carlo Minnaja;

komenco dimanĉe, 14h00, kadre de la inaŭguro de IKU - Ilona Koutny; komenco lunde, 9h00 - Prof. Tyburcysz Tyblewski; komenco anoncota, verŝajne merkrede. La precizaj temoj estos anoncigitaj surloke. Aliĝo kaj partopreno en la kursoj estas senkosta por ĉiuj kongresanoj. La kursoj havas nivelon taŭgan por homoj kun gimnazia eduko. AIS kunĝojo konstatas, ke la AISIKU-aranĝoj, kunlabore kun UEA, jam fariĝis tradicia ero de la UK-programoj. AIS-IKU estos ĉi-jare la tria el almenaŭ kvar AISkonferencoj; post Moskvo en marto kaj Bydgoszcz (PL) en aprilo/majo. En aŭgusto / septembro okazos "SUS 19" en Rimini (IT) kaj San-Marino (SM). La planoj pri jarfina konferenco ankoraŭ ne definitiviĝis. Dum SUS 19 okazos riĉa kadra programo, kiu enhavos literaturan vesperon kun kontribuoj el la verkaroj de la italaj aŭtoroj Leopardi kaj Casanova. La tradicia "Akademia Forumo" verŝajne daŭrigos la diskuton pri temoj de la Eŭropa integriĝo, komencitaj dum la Moskva AIS-forumo, al kiu kontribuis ankaŭ la Sovetia eks-prezidento Miĥajl Gorbaĉov, profesoro de la Teknika Sektoro de AIS.



## NOVA ELDONO DE LA GVIDILO DE INTERNACIAJ EKZAMENOJ

En majo aperis dua eldono de la gvidlibreto por la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA. La unua eldono de la gvidilo aperis en 1989 kaj post elĉerpiĝo ĝi estis senŝanĝe represita en 1996.

La unua parto de la 34-paĝa gvidilo enhavas la celaron, postularon kaj regularon de la ekzamenoj. En la dua parto estas specimenaĵoj de la ekzamenoj de ambaŭ niveloj. Interesitoj povas do ricevi bonan bildon pri la ekzamenoj kaj sekve pli bone prepari sin. La gvidilo taŭgas kiel ekzercilo por memstudantoj sed ankaŭ por kursoj.

La nova eldono estas reviziita de Atilio Orellana Rojas, la nuna prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA, kiu povis konsideri la spertojn el la ekzamensesioj, okazintaj jam en multaj landoj en ĉiuj kontinentoj. La libreto kostas 6,60 guldenojn. La libroservo de UEA donas trionan rabaton ekde tri ekzempleroj.

---

KSM estas prizorgata de s-ro Francois Xavier Gilbert. La adreso estas: **Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville en Barrois, Francio.**

## VIGLA JARO POR LA KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Koresponda Servo Mondskala de UEA ricevis 550 petojn el 59 landoj en 1997. Tio estis iomete malpli ol en 1996, kiam KSM ricevis 579 petojn. La nombro tamen restis sur pli alta nivelo ol en la jaroj 1993-1995, kiam ĝi variis inter 362 kaj 421.

Plej multaj petoj venis el Francio (102), Rusio (77), Madagaskaro (59), Brazilo (57) kaj Pollando (40). Rimarkindas la kresko en Pollando kaj Madagaskaro, el kiuj KSM en la antaŭa jaro ricevis respektive nur 8 kaj 14 petojn. Precipe en la kazo de Pollando tio verŝajne estas signo pri sentebla revigliĝo de la movada vivo en la lando. Aliflanke, la plej granda malkresko okazis en Brazilo (124 en 1996), sed tie temis nur pri reveno al la kutima nivelo post la surpriza svarmo de petoj en 1996.

La daŭra populareco de KSM montras, ke malgraŭ la kreskanta uzo de elektronika poŝto la tradicia korespondado plu restas. Krome, nur malgranda minoritato de esperantistoj disponas pri komputilo. UEA alvokas precipe al la instruistoj de Esperanto kaj al kluboj, ke ili utiligu la servojn de KSM kaj diskonigu ĝin inter la lernantoj de nia lingvo.





## ESPRANTO KAJ KONTAKTO PLI LEGATAJ EN 1997

La revuo ESPERANTO denove superis la limon de 5000 abonantoj, plifortigante tiel sian pozicion kiel la plej disvastigita Esperanto-periodaĵo. En 1997 ESPERANTO iris al 5003 ricevantoj en 115 landoj, kiuj kotizis en unu el la "revuaj" membrokategorioj de UEA aŭ kiuj abonis la revuon aparte. En 1996 tiu nombro estis 4932.

KONTAKTO, la soci-kultura revuo de TEJO, siavice faris novan rekordon de la nombro de pagitaj ricevantoj. Post 2009 abonoj en 1996 la nombro kreskis al 2050 en 1997. Per la jarkolekto 1997 Francisco L. Veuthy finis 6-jaran sukcesan redakto-recon, dum kiu KONTAKTO fariĝis enhave vigla kaj grafike modela inter la Esperantogazetoj.



## SIMPOZIO DE UEA EN LA UN-SIDEJO TRAKTIS LINGVAJ RAJTOJN

Precize en la samaj tago kaj urbo, en kiuj Universala Esperanto-Asocio estis fondita antaŭ 90 jaroj, okazis la Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj. Kvardeko da partoprenantoj kolektiĝis la 28-an de aprilo en la Palaco de Nacioj al simpozio, kiun UEA organizis sub aŭspicioj de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj.

La simpozio markis du datrevenojn: la 90-jariĝon de UEA kaj la 50-jariĝon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La fortan ligan de UEA al la principoj de la Universala Deklaracio indikas i.a. la fakto, ke jam ekde 1947, do unu jaron antaŭ la akcepto de la Deklaracio, UEA deklaras en sia statuto, ke "la respekto de la homaj rajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo".

La Alta Komisiito s-ino Mary Robinson sendis salutmesaĝon al la simpozio. Ĉar la simpozia temo rilatis unuavice al UN kaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-j), la simpozio disvolviĝis grandparte anglalingve. Flanke de UN-instancoj ĉeestis Zdzisłaŭ Kedzia, supera konsilanto al la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj, kaj Cecilia Thompson el la UN-Oficejo pri Homaj Rajtoj. Alvenis reprezentantoj de la organizaĵoj

Civitanoj de la Mondo, Federacio por Studo de Monda Estonteco, Federa Unuiĝo de Eŭropaj Nacioj, kaj SERVAS.

La enkonduka prelego de prof. Humphrey Tonkin, kiu prezidis la simpozion, traktis lingvajn kaj homajn rajtojn el historia perspektivo. Prof. Lee Cong-Yeong prelegis pri la lingvaj rajtoj kiel fundamento de la homaj rajtoj. La aliaj prelegantoj estis prof. Christoph Pan, direktoro de Sudtirola Instituto pri Etnaj Grupoj en Bozen / Bolzano; d-ro Fernand Varennes, direktoro de Azia kaj Pacifika Centro por Homaj Rajtoj kaj Prevento de Etnaj Konfliktoj, Cecilia Thompson de la UN-Oficejo pri Homaj Rajtoj, kaj la konataj esperantistaj fakuloj Claude Piron kaj Mark Fettes. UEA planas eldoni la altnivelajn prelegojn kiel libreton.

Post la simpozio la urbo Genevo regalis la partoprenintojn per aperitivo en la Palaco de Nacioj.

**KONKLUDOJ KAJ REKOMENDOJ** de la Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj organizita de Universala Esperanto-Asocio sub aŭspicio de la Alta Komisiito de Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj, Genevo, 28 aprilo 1998

### 1. Por kunlaboro pri lingvo kaj homaj rajtoj

Lingvaj rajtoj estas fundamenta parto de la homaj rajtoj. Protekto de

lingvaj rajtoj necese baziĝas sur du ĝeneralaj principoj:

\* la uzado kaj evoluigado de lingvoj kiel rimedoj de socia organizo kaj kultura esprimiĝo;

\* la enradikigo de lingva egaleco kaj la forigo de lingvaj handikapoj en intergrupaj kaj interpersonaj rilatoj.

Konsciante pri la klopodoj de la UN-Komisiito pri Homaj Rajtoj (UNHĈR) agnoskigi kaj certigi la unuan el tiuj principoj, kaj pri la kontribuoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) realigi la duan, la Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj rekomendas la starigon de longperspektivaj kunlaboraj rilatoj inter la du organizaĵoj.

### 2. Kunlaboro sur la kampo de homaj rajtoj

Ekzistas granda malcerteco kaj malkonsento pri la etendiĝo de ekzistantaj lingvaj rajtoj, kaj pri la dezirindeco de ilia plua reguligado kaj dis- vastigado. La Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj rekomendas ke UNĈR kaj UEA kune serĉu vojojn kaj rimedojn por respondi al jenaj demandoj:

\* Kiel nun interpretas lingvajn rajtojn la instancoj respondecaj pri ilia protekto kaj plenumo, kaj kiel oni povas instigi tiajn instancojn al pli alta nivelo de interpretado kaj

plenumado?

\* Kiuj tipoj de lingva handikapo aŭ lingva malegaleco jam necesigas aŭ pravigas la enkondukon de kontraŭ-diskriminaciaj rimedoj sur la jura aŭ aliaj kampoj?

Respondoj al tiuj demandoj devus maksimume utiligi jam faritan laboron sur tiuj kampoj, kaj eble konduki al unufoja aŭ perioda raporto pri lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco en tutmonda skalo.



### 3. Kunlaboro kun aliaj branĉoj de UN

Lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco ne realiĝas nur per leĝoj kaj konvencioj, sed postulas agadon sur la diversaj kampoj de la laboro de UN kiel komunikado, edukado kaj kultura evoluigado. La Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj rekomendas ke UNĈR kaj UEA kunlaboru por instigi la branĉojn de UN al komuna uzado de siaj

prilingvaj spertoj kaj rimedoj, interalie per jenaj paŝoj:

\* organizado de interbranĉa konferenco pri lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco, cele al starigo de laborgrupo aŭ alia forumo por interbranĉa kunlaboro pri lingvaj temoj;

\* ellaboro de komuna programo aŭ centro sub aŭspicio de UN por la esplorado kaj dokumentado de lingvaj rajtoj, interlingvistiko kaj lingvopolitiko, kun aparta atento al la laborkampoj de la diversaj branĉoj de UN.

### 4. Kunlaboro kun neregistaraj organizaĵoj (NRO-j)

Lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco dependas ne nur de la decidoj de registaroj kaj interregistaraj organizaĵoj, sed ankaŭ de la sintenoj kaj kondutoj de individuoj kaj de civitanaj asocioj. La Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj rekomendas, ke UEA, kun la subteno de UNĈR, invitu elektitajn internaciajn NRO-jn kunfundi Koalicion por Lingvo kaj Homaj Rajtoj, kun jenaj taskoj:

\* faciligi interŝanĝon de informoj kaj spertoj pri temoj kiuj rilatas al lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco, pere de

novajbulteno, renkontiĝoj kaj aliaj rimedoj;

\* intime kunlabori kun UNĈR kaj aliaj branĉoj de UN por instigi al sistema konsiderado de lingvaj demandoj en internaciaj politikaj debatoj, kaj por faciligi la kontribuadon de popolaj organizaĵoj kaj de fakuloj pri lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco.

## LA ESTRARO DE UEA ELEKTIS KONGRESURBOJN POR 2000 kaj 2001

La nuna Estraro de UEA kunvenis por la lasta fojo en la Centra Oficejo la 26-an kaj 27-an de aprilo. Ĉiuj sep estraranoj ĉeestis la kunsidon, kiu pro la sabata Malferma Tago escepte okazis en dimanĉo kaj lundo. Apud la rutinaj organizaĵaj kaj financaj demandoj la plej interesa punkto de la tagordo estis la elekto de la urbo de la Universala Kongreso en la jaro 2000. Kandidatis du urboj, Zagrebo kaj Tel-Avivo. Ĝenerala direktoro Osmo Buller, kiu esploris la kondiĉojn surloke en ambaŭ urboj, proponis elekti Zagrebon. Li opiniis, ke la situacio en Mez-Oriento estas tro malstabila kaj nesekura, pro kio estus tro riske, i.a. pro financaj konsideroj, elekti kongresurbon tie. Plimulto de la estraranoj tamen ne

trovis tiun riskon tro granda kaj sekve Tel-Avivo ricevis la honoron. Tel-Avivo estis kandidato jam por la tria sinsekva fojo kaj Esperanto-Ligo de Israelo estis anoncinta, ke ĝi ne renovigus la inviton por posta jaro. Siavice Zagrebo pretis okazigi UK ankaŭ en 2001. La Estraro tuj utiligis tiun pretecon kaj sekve elektis Zagrebon por tiu jaro. Kun granda kontento oni informiĝis pri la financa evoluo de UEA en la pasinta jaro. Kvankam ĝi estis jaro de malgranda UK, kiam la enspezoj pro kotizoj emas esti malpli grandaj, la financa rezulto tamen estis pli bona ol en la antaŭa jaro. La UK en Adelajdo ja estis deficitita (ĉ. 24.000 gld.), sed tio estis antaŭvidita en la buĝetado. En la nuna jaro la bona evoluo plu daŭras, i.a. pro la kresko de la membraro kaj granda UK. Ĝis la dato de la estrarkunsido la Montpeliera UK arigis jam pli ol 2500 aliĝintojn. Kvankam la financa evoluo de UEA estas tre bona, daŭre estas malfacile realigi la nepre necesan pligrandigon de la laborforto en la Centra Oficejo. Tiurilate la estraranoj sendube forlasis la kunsidon kun malbona konscienco pro la fizike ĉiam pli ne-eltenebla situacio por la stabanoj de la CO, kiuj devas rezigni pri libera tempo kaj ferioj por plenumi la farenadojn ĝustatempe. La malkontento de la direktoroj indikas, ke tiurilate oni ne plu povas prokrasti la decidojn.

Kvankam la ekonomio de la "gepatra" UEA fartas pli kontentige ol antaŭe, tiu de la junulara sekcio TEJO kaŭzas zorgojn. La IJK-oj de 1996 kaj 1997 kreis sume pli grandan deficiton ol la UK de Adelajdo. Tia evoluo estas tre danĝera. La UEA-estraranoj do tre maltrankvilis, ke iliaj TEJO-kolegoj ne donas al sufiĉan atenton al tiu problemo.

## APERIS LA AKTOJ DE LA NITOBE-SIMPOZIO

Kadre de la 81-a UK en Prago en 1996 UEA okazigis simpozion pri la lingva problemo en internaciaj organizaĵoj. La simpozio estis nomita laŭ Nitobe Inazo, iama asista ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj. Li partoprenis la 13-an UK en Prago 75 jarojn pli frue kaj verkis pri siaj impresoj fundan raporton por la Ligo de Nacioj. UEA ĵus eldonis la prelegojn kaj diskutojn de la Nitobe-simpozio libroforme sub la titolo "Al lingva demokratio". La 212-paĝa libro estas redaktita de Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Inter la aŭtoroj estas konataj lingvopolitikistoj de nia movado kiel M. Fettes, H. Erasmus, H. Tonkin, K. Deguĉi, T. Kobayaŝi, M. La Torre kaj el ekster la movado Y. Peeters, R. Phillipson, T. Skutnabb-Kangas, A. Wynne Jones. M. Busdaĉin, J. Poth,

kaj multaj aliaj. Ili traktas i.a. jenajn temojn: Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj organizaĵoj utilas nur por simbolaj politikaj celoj? Ĉu aktualaj modeloj de plurlingva demokratio efektive diskriminacias? Kian rolon ludu lokaj lingvoj en la solvado de mondaj problemoj? Kion eblas lerni el la spertoj pri Esperanto? La kontribuajfoj aperas en la lingvo, en kiuj ili estis originale faritaj: Esperanto, angla aŭ franca. Ili krome estas resumitaj en ĉiuj tri lingvoj. Aparte valora estas la aperigo de la pionira raporto de Nitobe, "Esperanto kaj la lingva demando ĉe la Ligo de Nacioj", ĉar ĝi neniam antaŭe estis publikigita komplete. Prof. Marc van Oostendorp diras pri ĝi en la revuo "Esperanto" (aprilo 1998): "La raporto havas vere mirinde honestan kaj koncizan tonon. La leganto pensas: se nur pli da internaciaj altranguloj havus tian akran vidon: se nur pli da homoj eldirus en tia simpla sed konciza stilo ke la tradukista robo de la reĝo tamen ne estas tiel bone videbla!" La libro kostas 22,50 gld. La libroservo de UEA donas trionan rabaton ĉe aĉeto de minimume tri ekzempleroj.



## Informace sekretariátu

Jak jsme Vás informovali ve Startu 2/98, proběhla inventura Libroserva ČES, během které byly knihy a ostatní zboží překontrolovány. Dle inventurního soupisu nám na skladě zůstává zboží v hodnotě 383.363 Kč, které je majetkem svazu a další zboží v hodnotě 100.700 Kč, určené do komisního prodeje.

Dne 23.5.1998 proběhla ve skladu Libroserva brigáda, tentokrát Věra Podhradská, Miroslava Kosnarová, ing.Zdeněk Pluhař, dr. Petr Chrdle a Vladislav Hasala balili strašně moc dárkových balíčků. Ptáte se proč a pro koho? Při inventuře jsme zjistili, že máme na skladě některých E-materiálů velkou zásobu, proto výbor svazu rozhodl věnovat bezúplatně knihy, pohlednice apod. jednotlivým klubům a sekcím na podporu činnosti. Balíčky jsou odesílány postupně v průběhu června 1998 na korespondenční adresy jednotlivých složek ČES. Upozorňujeme, že pokud je některá adresa společná pro více složek (např. EK Poděbrady a sekce KELI), je zásilka sloučená.

Krajičková

**Nakladatelství KASTL s.r.o.** hledá *obchodní zástupce* pro zajišťování reklam do plánů měst. Volejte na tel. 0324/5651 nebo pište na adresu: Pavel Polnický, Lesní 150/VI., 290 01 Poděbrady.

**Upozornění pro kluby, sekce a komise, které podávají Českému esperantskému svazu vyučování záloh nebo posílají doklady k proplacení výdajů (např. cestáky):** po schválení pověřeným funkcionářem příslušné složky (klubu, sekce, komise) zašlete vyučování či doklady neprodleně, nejpozději pak do konce čtvrtletí, ve kterém byl výdaj realizován.

V zájmu rychlého proplacení posílejte přímo na adresu pokladní ČES: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno.

## Nova eldonajo en Esperanto

Ĵus aperis en la eldonejo KAVA-PECH nova verko en Esperanto „Badenlanda legendaro de la Konstanca Lago“ verkita de Benoit Philippe. Temas pri pli ol 100 mallongaj ĉarmaj legendoj de ĉelaga badenlanda regiono, inter kiuj estas ankaŭ la legendo „La Koncilio“ ligita al la bruligo de Majstro Jan Hus en Konstanco - ĉefurbo de tiu regiono. Pro aro de mallongaj tekstoj la verko estas konvena kiel legado dum vojaĝoj, sed ankaŭ kiel enkonduka beletra legado por komencantaj esperantistoj post la kurso. La verkon kompletigas ilustraĵoj de Mikolaŝ Aleŝ. Ĝi jam estas mendebla ankaŭ en la libroservo de ĈEA. 128 paĝoj, prezo por ĉeĥaj esperantistoj 126 Kč

Petro Chrdle



# Přehled hospodaření ČES v roce 1997

(Schváleno dozorčí radou)

## Příjmy

Členské příspěvky	96.414,50 Kč
Tržby z prodeje knih, pohlednic, odznaků	35.881,60 Kč
Písemné kurzy	245,- Kč
Členské příspěvky UEA	11.901,82 Kč
Předplatné časopisů	3.562,75 Kč
Přijaté úroky	10.706,82 Kč
Dary	33.036,75 Kč
Dividendy	1.150,10 Kč
Prodej cenných papírů	9.665,80 Kč
Mimořádné akce 1)	133.439,90 Kč
<hr/>	
Celkem příjmy	336.005,04 Kč

## Výdaje

Ostatní osobní výdaje	34.471,- Kč
Cestovné	24.454,40 Kč
Poštovné, telefony	41.115,65 Kč
Vydavatelská činnost	51.507,80 Kč
Prodej zboží ze skladu	23.873,- Kč
Spotřeba režijního materiálu	12.114,70 Kč
Ostatní nevýrobní služby 2)	63.658,- Kč
Daně, poplatky	6.910,50 Kč
Ostatní výdaje	8.866,20 Kč
Konference ČES v Praze	58.990,30 Kč
<hr/>	
Celkem výdaje	325.961,55 Kč

Hospodářský výsledek = úspora 10.043,49 Kč

Vysvětlivky:

1) výnos Konference ČES v Praze a částečné vypořádání UK Praha

2) odpis nedobytné pohledávky Tourgast a doučtování výdajů kongresu ČES v Havířově

Odesílatel:

Český esperantský svaz  
ESPERANTO, p. s. 1069  
111 21 Praha 1  
**Internet:** cea @ tnet. cz  
www.kuk.cz/cea  
☆☆ **STARTO** ☆☆

Periodikum Českého esperantského svazu (29. ročník)  
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto  
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

---

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (29-a jarkolekto)  
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio  
Abonprezo: 16 gld  
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, e-mail: starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto  
Presis: OPATISK Opava

---

Podávání novinových zásilek povoleno  
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,  
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X



# NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti  
u pošty 746 01 Opava 1